

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2013

Ĵaŭdon la 29an de aŭgusto

61a jaro

Kalendaro

ATENTU: La kunvenoj komenciĝos je la **18a**.

Lundon la 2an de septembro (semajno 36) – mandag

Speciala kunveno por novaj interesiĝantoj. Sed ankaŭ jamaj membroj bv. veni renkonti la novulojn kaj helpi respondi iliajn demandojn.

Spesielt møte for nye interesserte. Men også for medlemmene som vil møte de nye og svare på spørsmålene deres.

Lundon la 16an de septembro (sem. 38) – mandag

Ni prikomentos la ĵusan parlamentan elekton kaj la referendumon pri la Olimpiaj ludoj. Enkondukos Harald Rygg kaj Kristoffer Haug.

Vi kommenterer stortingsvalget og folkeavstemningen om OL 2022. Innledninger ved Harald Rygg og Kristoffer Haug.

Atentu /Obs: ni plifruigas / fremskynder la unuan oktobran kunvenon al:

lundo la 30a de septembro (sem 40) – mandag

Pri la Universala Kongreso en Islando. Ok klubanoj partoprenis. Vidu *Norvega Esperantisto* 4, p. 15.

Om verdenskongressen i Reykjavík i sommer. Åtte av våre medlemmer var der. Vidu N-a Esperantisto 4, p. 15.

Lundon la 21an de oktobro (sem 43) – mandag

En la Esperantista Aŭtuna Migrado en Germanio kaj ankaŭ la Fervoĵista + la franca kongreso en Bordeaux partoprenis Kjell Peder Hoff kaj li prezentos siajn impresojn.

Kjell Peder Hoff forteller hvordan han opplevde Høstvandringen i Tyskland og jernbanefolkenes kongress (og samtidig den franske) en Bordeaux.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (nur tramo) laŭ la samnoma flankstrato.

OKAZIS

Lundon 15. aprilo

Kjell Peder raportis pri la Printempa Seminario Internacia (PSI) en Germanio, kie li partoprenis paske. Ĉi-jare ĝi okazis en St. Andreasburg (Harz) kaj oni aranĝis ekskurson al proksima Herzberg – la Esperanto-urbo.

Lundon 6. majo

Klimavalg / Klimat-elekto estas alianco de pli ol 60 organizoj, kiu celas igi la klimatsanĝigojn grava temo de la debatoj antaŭ la aŭtunaj parlamentaj elektoj. Kristoffer aktivas tie, kiel reprezentanto de membro-organizo Norvega klimat-reto, kaj li respondis niajn demandojn pri la

funkciado kaj esperoj de ĝi kaj de la alianco.

Lundon 3. junio

Ni trarigardis la planon por la landa kongreso, pri kies praktikaj flankoj nia klubo respondecas: inform-ekspozicio, librovendado, prelego pri Aasen/Zamenhof, ekskursoj, ĵurnalistoj kaj flago.

Lundon 17. junio

Ni diskutis pri la ĵusa landa kongreso, pri kies praktikaj flankoj respondecas nia klubo. Ĝenerale ĝi estis sukcesa, kun pli ol ordinaraj viglaj diskutoj, sed plurajn detalojn ni povintus plani pli bone. Vd. *N.E-isto* 4, p.5.

Info-budoj en foiroj?

Bonan okazon renkonti la publikon kaj informi pri Esperanto donas inform-budoj en foiroj, konferencoj kaj festivaloj, sed ili ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en loka biblioteko. Se vi vidos / aŭdos pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

Malmulte da gastoj

Malmultis la eksterlandanaj gastoj ĉi-somere: lingve tre lerta juna aŭstrialano, kiu lernis E-on sen frekventi sian lokan klubon en Melbourne, du koreaj fratinoj kiuj turistumis tra Nordio post la UK, kaj sufiĉe kosmopolita filino de István Ertl (i.a. iama redaktoro de Revuo *Esperanto*).

Informbudo en la Mela-festivalo

EN LA MEZA semajnfino de aŭgusto ni starigis informbudon pri Esperanto en la granda Iqra-tendo de la Mela-festivalo sur la Urbodoma Placo. (Iqra signifas 'legi' aŭ 'scio' i.a. en la araba, kaj Mela 'renkontiĝi' aŭ 'renkontiĝejoj' en la sanskrita.) Tio estas ĉiujara aranĝo, kiun ni partoprenis ekde 2009 (sed ne en 2011, kiam oni ne starigis la Iqra-tendon pro la ĵusa atenco 22. julio).

Tiu informejo estis malferma entute 17 horojn. Deĵoris Bjørn Øyen, Douglas Draper kaj Asbjørn Lindh. La publiko tie estas plejparte enmigrintoj – el la tuta mondo – sed inter ili ankaŭ denaskaj norvegoj. Junuloj, familioj kaj pliaĝuloj.

Ni ofertis la kutimajn informbroŝurojn, i.a. la novan *Oppdag Esperanto*, kaj – nove ĉi-jare – invitis la publikon solvi "puzlojn": La plej facila estis *Kan du telle til ti på esperanto?* – kartonaj slipoj kun la numeroj unu, du, tri ... dek, kiujn oni aranĝu en la ĝustan sinsekvon. Iuj faris tre rapide, surbaze de scio de latino aŭ de iu latinida lingvo, aliaj bezonis helpon: rememoru *duo, trio, kvartett ...* aŭ *september, oktober, ...*. Al la pli kuraĝaj ni ofertis alian puzlon, pri proverboj en Esperanto kaj la norvega. La defio estis parigi ilin, do ekzemple elekti por "Matena horo estas plena de oro" el pluraj norvegaj proverboj la ĝustan: *Morgenstund har gull i munn*. Ĉiuj sukcesis pri la unuaj, facile rekoneblaj proverboj, sed iuj bezonis helpon pri la lastaj. Tiuj ekzercoj engaĝis la atenton de la foiranoj kaj montris rekte kia estas nia lingvo.

Kiel ni ofte spertas nuntempe, la plej multaj kiuj haltis ĉe nia budo neniam aŭdis pri Esperanto antaŭe, kaj ni povis nur sloganece klarigi pri ĝi kiel facila, neŭtrala internacia lingvo. Sed kelkaj estis jam bone informitaj, eĉ lerninte la bazojn per *Lernu* aŭ alia interreta kurso. Unu ankaŭ havis bone fundamentitajn kritikajn vidpunktojn pri la vortprovizo.

Ni ne invitis al kurso, ĉar ni havas la sperton ke homoj senpripense aliĝas, tamen poste ne venas. Sed ni donis al ili aktualajn interretajn adresojn kiel *lernu.net*. Ni ankaŭ kolektis retpoŝtajn adresojn de kelkaj simpatiantoj, kaj poste invitis ilin speciale al la unua kluba kunveno lundon 2. septembro.

Tia aranĝo estas unu el la maloftaj okazoj kie ni povas renkonti la publikon kun nia oferto de justa internacia komunikilo. Alia estas la konferenco pri tutmondiĝo / *Globaliseringskonferansen*. Sed du semajnfinoj jare estas maltro: Ni bezonas pliajn! **Do se vi aŭdos pri iu foiro aŭ konferenco, kie konvenas starigi informbudon aŭ ekspozicion, bv. atentigi nin!**

DD/

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Nun ni havas unu eblan luonton por novembro, sed verŝajne temas nur pri kelkaj tagoj. Ni bezonas pliajn por kovri niajn konstantajn dom-elspezojn. Do ni refoje demandas:

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter!

Libroj k.a. en la vendobretaro

Lærebok for nybegynnere: Esperanto – den direkte metoden – basert på tegninger, av Stano Marček. Fotnoter og forklaringer på norsk. Egner seg ypperlig for selvstudium. 2007 **norsk utg. 2012.** 116 s. **45 kr.** K-disko 80 kr.

Kalevala. La fama finna nacia epopeo. 392 p. Ilus. Malmole bindita. 90 kr.

Michael Ende: **La senĉesa rakonto.** 364 p. Malmole bindita. 175 kr.

Karolo Darwin: **La Origino de Specioj** 430 p. 180 kr.

Esperanto – över 50 miljoner träffar. [Nun > 170 milionoj!] Lars Forsman rakontas el siaj spertoj pri instruado al lernantoj el la tuta mondo dum 18 jaroj en la popolatlernejo de Karlskoga. Amplekse ilustrita. 95,- .

T-ĉemizoj po 100 kr

Verdaj, kun blanka teksto *Vi snakker esperanto. Gjør du? .*

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto er kult.*

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto la internacia lingvo*

Glumarkoj: ruĝaj (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj; Ankaŭ (svedaj) kun verda stelo kaj la vorto "Esperanto" en parolveziko (videblas interrete ĉe esperanto.se).

Stokoj de ĉi ĉiom en la klubejo; ankaŭ de vortaroj, gramatikoj, literaturo.

Kompletan liston de vendotaj libroj k.s. vi trovos interrete ĉe esperanto.no – > LIGILOJ (supre) -> Literaturo ... -> librolisto.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

www.esperanto.no/oslo

Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>

Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper (sed silente aprobis ĝin la ceteraj estraranoj).